

**Kie nin trovi!
Where to find us!**

On the second Monday of each month we meet at 74 Leybourne Road, Leytonstone, E11 3BT



Orientlondona



Orientlondona Esperanto

Orientlondona Esperanto

(East London Esperanto)

<http://www.greenrats.org.uk>

Antaŭe la Ilforda Esperanta Societo, originale fondita en junio 1904
Formerly the Ilford Esperanto Society, originally founded in June 1904

KATHLEEN WOLLEDGE

En la lasta eldono de la bulteno ni vidis grupfoton de samideanoj, eble en Hoddesdon, antaŭ la Dua Mondmilito. La sekretario nun havas unu el du albumoj, kiun kunmetis Kathleen Wolledge, Esperantistino de Sudlondono, inter 1929 kaj 1930. Kathleen, montrata en la dekstra foto, evidente Esperantistiĝis en 1929, ĉar la unuaj



paĝoj de la albumo estas skribitaj en la angla, dum la postaj estas en Esperanto. En aŭgusto 1930, Kathleen partoprenis la Universalan Kongreson en Oxford. Laŭ la statistoj de UEA, 1,211 Esperantistoj ĉeestis, inkluzive de kelkaj kiuj estas nun famaj en la movado. En la maldekstra foto estas Julio Baghy, kiun Kathleen fotis en remboato sur la Rivero Cherwell. Kompreneble Baghy, hungaro, estas nun

bonkonata, kiel verkisto kaj poeto.

En la albumo la du subaj fotoj estas sur paĝo kun la titolo "La Zamenhof Familio." Bedaŭrinde la dekstra el la du fotoj ne estas klara, sed la maldekstra ja estas. La problemo estas, ke la nomoj de la familianoj ne estas skribitaj kun la fotoj. Ĉu eblas, ekzemple, ke la viro estas Adamo? Se vi havas ideojn, bonvolu kontakti la sekretarion, kies adreso estas sube.

La dua albumo, kiu inkluzivas la UK en Stockholm, en 1934, ne estis trovebla kiam nia sekretario havigis la unuan, sed ĝi lastatempe reaperis, kaj espereble ni baldaŭ ĝin havos.



**Sekretario: 'Esperantujo', 12 Packard Place, Bramford, Suffolk, IP8 4HA,
Tel. 01473 461346, retadreso: rokeby@globalnet.co.uk**



Se vi deziras partopreni niajn retkunvenojn pere de Skype, vi devas unue ligi kun unu el la anoj, kiu estras la kunvenon. Vi tion faru per la entajpo de la nomo...

aŭ **Roy Simmons**
aŭ **Marko Drejko**

kaj la sendo de mesaĝo kiu petos kunligon. Ni respondos, kaj vi estos kunligita. Ni ne devas fari tion denove.

Poste, kiam vi deziras partopreni, voku unu el ni kaj ni aldonos vin al la konversacio.

Bonŝancon!



SOLVO kaj ENIGMO

La fama Esperantistino en la lasta eldono estis:

Lidia Zamenhof

Kaj nun enigmo de Daniel Hayon:

Kiu verkas interne kaj ekstere?

ENIGMO



N	E	R
S	O	K
J	G	O

Kiom da vortoj de kvar literoj aŭ pli vi povas fari el la literoj montrataj ĉi tie? Vi devas havi almenaŭ unu vorto de naŭ literoj kaj uzi la mezan literon.

(Bone - 12 vortoj, Bonege - 20 vortoj)

Kunvenoj en majo ĝis junio

mardo la 1a de majo
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

7a de majo/May 7th
Grupkunveno
Group Meeting

mardo la 15a de majo
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

mardo la 22a de majo
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

mardo la 29a de majo
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

mardo la 5a de junio
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

11a de junio/June 11th
Grupkunveno
Group Meeting

mardo la 19a de junio
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

mardo la 26a de junio
Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)

May to June Meetings


Grupkunvenoj/Group Meetings
okazas 7.30 - 9.00 ptm ĉe
74 Leybourne Road, Leytonstone

Studrondo interreta
(nur Esperantlingve)
okazas 8.00 - 9.00 ptm
pere de la interreto kaj Skype.
Ni legadas "La Mastro de l'Ringoj,"
de J R R Tolkien (tradukita de W Auld)
Novaj partoprenantoj kunligu antaŭe kun
Marko Dreiko aŭ Roy Simmons por
esti en la grupo.

When they occur, Beginners' Groups
take place at a mutually convenient
time and place.

LA LONDONA ESPERANTO-KLUBO

La ĉefaj kunvenoj nun okazas ĉe
Diorama Arts Studios, 201
Drummond Street, Regent's Place,
London NW1 3FE. Por la momento
la babil-vesperoj okazos ĉe Hotel



IBIS London City (Shoreditch –apud
metrostacio Aldgate East), sed
povos okazi aliloke pli poste dum la
jaro. Konsultu la programon por
konfirmi la kunvenlokojn.

The main meetings now occur at the
Diorama Arts Studios, 201
Drummond Street, Regent's
Place, London NW1
3FE. For the moment the
informal chat meetings
take place at Hotel Ibis
London City (Shoreditch - next to
Aldgate East Underground Station),
but this may change. Check the
programme to confirm location.

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>



LA BRITA KONGRESO EN NOTTINGHAM Pentekosto, 1930




Kiel en la lasta eldono de la bulteno, jen grupfoto de britaj Esperantistoj ĉe kongreso. Ĉi tiu foto, tamen, havas titolon. Ĝi montras partoprenintoj de la Brita Kongreso en Nottingham dum la Pentekosta ferio en 1930. La kvalito de la foto estas bonega, kaj verŝajne ĝi estas la oficiala foto de la okazaĵo, farita de profesia fotografo. Kathleen Woolledge, en kies album la foto estas fiksita, metis tri iksojn sub la grupo. La maldekstra montras Edmond Privat, la meza Frank Goodliff, fratuklo de BEA kaj unu el la organizantoj de la kongreso, kaj la lasta ikso montras Merwick kaj Mawson, kiuj estis bonkonataj Esperantistinoj tiutempe. Kiam la du albumoj de Kathleen Wolledge estas en unu pakaĵo kune kun kelkaj emblemoj, ktp., la intenco estas doni ĉion al la Biblioteko Butler.

ESTONTAJ ELDONOJ

Por ke la bulteno daŭru, ni bezonas helpon. Do, se vi havas ideojn por malgrandaj artikoletoj, poemoj, ŝercoj, ktp, bonvolu sendi ilin al la bultenisto. La adreso estas sur la unua paĝo. Novajn ideojn ni bezonas.

Roy S



103a UNIVERSALA
KONGRESO
de ESPERANTO

LISBONO 2018
28 JULIO - 4 AUGUSTO